


# KRUCVOJO

por infanoj



*La krucvojo estas la preĝo, kiun la kristanoj vivas dum la Karesmo, por sin prepari bone al la Sankta Semajno antaŭ la Pasko.*

*La krucvojo estas kiel strato, kiu memorigas al ni la doloran itineron de Jesuo envojiĝanta al la krucumado sur la monto Golgota. En ĉiuj katolikaj preĝejoj estas mura krucvojo.*

*La fideluloj laŭiras la "Irejon de la kruco", haltante por preĝi antaŭ la 14 stacioj.*

*Ĉiu stacio memorigas momenton de la pasiono de Jesuo.*

## UNUA STACIO

### Iesuo estas kondamnita al morto



*Vi estas tute sola, neniuj amikoj helpas vin.*

*Neniuj defendas vin.*

*Vi pasigis la tutan vivon helpante la aliajn,*

*miraklante, kuracante la malsanulojn kaj*

*farante favorojn al ĉiuj.*

*Kaj nun ili mortigas vin.*

**DUA STACIO**  
**Jesuo transprenas sian krucon**



*La soldatoj mokas vin, metas dornokronon sur  
vian kapon kaj ŝarĝas vin per kruco. Vi ne  
protestas, silente vi direktiĝas al la kalvaria  
vojo.*

## TRIA STACIO

**Jesuo falas la unuan fojon sub la kruco.**



*Vi estas malforta, Jesuo, kaj svenanta pro la doloro kaj vi falas.... Neniu sin montras al vi helpema, male la soldatoj puŝas vin, piedbatas vin kaj krias, ke vi tuj releviĝu. Povra Jesuo, kiel oni traktas vin malbone!  
Sed kun granda volo vi tuj releviĝas kaj daŭrigas tion, kion vi komencis.*

## **KVARA STACIO**

### **Jesuo renkontas sian Patrinon**



*Inter la krioj kaj la insultoj finfine vi renkontas iun, kiu amas vin kaj sentas doloron por vi: vian patrinon. Ŝi turnas sian rigardon al vi kaj komprenigas al vi, kiom multe ŝi amas vin.*

## KVINA STACIO

### Simono el Kireno helpas Jesuon porti la krucon



*La soldatoj vidas ke vi, Jesuo, estas senforta,  
tiam ili elektas inter la homamaso viron  
nomatan Simono el Kireno kaj devigas lin porti  
la krucon.*

*Helpa gesto, kiun vi, Jesuo, certe ne forgesos,  
ĉar ĉiu ama gesto estos poreterne.*

## SESA STACIO

### Veroniko viŝas la vizaĝon de Jesuo



*Abrupte virino malfermas al si la vojon inter la homamaso. Ŝia nomo estas Veroniko.*

*Ŝi prenas tolon kaj viŝas al vi la vizaĝon por forigi la ŝviton kaj la sanĝon. Ŝi oferas al vi iom da konsolo kaj, por premii ŝian bonan agon, vi faras tiel, ke estu videbla sur la tolo via vizaĝo, suferanta sed milda kaj bona.*




**SEPA STACIO**  
**Jesuo falas la duan fojon**



*Vi falas duafoje sur la Kalvaria vojo; la pezo de la kruco iĝas pli kaj pli peza, sed vi streĉas viajn fortojn, kaj nun vi estas preta por daŭrigi vian iradon, kiu portos vin al via morto kaj al nia savo.*

## OKA STACIO

### Jesuo admonas la plorantajn virinojn



*Jesuo, vi renkontas kelkajn virinojn, kiuj ploras,  
ĉar vidas vin laca kaj malĝoja.*

*Vi ne volas, ke ili ploru.*

*Vi preferas ricevi helpon, vi volas, ke nia koro  
kaj niaj manoj ĉiam estu malfermitaj por  
donaci.*

## NAŬA STACIO


### Jesuo falas la trian fojon



*Vi estas alproksimiĝanta al la monto Kalvario kaj ankoraŭ vi falas. La supro de tiu monteto simbolas la finon de via vivo sed ankaŭ la lokon, kie vi savos la homaron. La vido de Kalvario donas al vi la necesan forton por releviĝi ankoraŭ unufoje kaj daŭrigi la iradon. Vi releviĝas, prenas la krucon kaj reiras.*

## DEKA STACIO

### Jesuo estas senvestigata



*La soldatoj deŝiras de vi la mantelon, kiun ili metis sur vin post la skurĝado. La vundoj malfermiĝas ankoraŭ, kaj la tuta korpo estas plenkovrita de sango. Kelkaj personoj mokas vin kaj insultas. Ili petas vin fari miraklon, kaj tiam ili kredos je vi. Ili ne scias tion, kion vi estas faronta: la plej grandan miraklon, la savon de la tuta mondo.*


## DEKUNUA STACIO

### Jesuo estas alnajlita al la kruco



*Nur vi estas sternita sur la kruco kaj la soldatoj komencas enbati grandajn najlojn en la manojn kaj en la piedojn. Ĉiuj mokas vin. La soldatoj ludis per kuboĵ viajn vestojn, ĉiuj ŝajnas krueliĝi. Vi donis al ili amon kaj per via boneco vi pardonis ilin dirante: "Patro, pardonu ilin....."*

**DEKDUA STACIO**  
**Jesuo mortas sur la kruco**



*Vi estas mortanta sur la kruco. Mi silentiĝas dum kelkaj minutoj por diri al vi miajn sentojn kaj mian amon por vi.*


**DEKTRIA STACIO :**  
**Jesuo estas forprenata de la kruco**



*La soldatoj dekroĉas vin, Jesuon, kaj metas vin en la brakojn de via patrino, kiu ploras mildajn larmojn por vi.*

## DEKKVARA STACIO

### Jesuo estas entombigata



*Vi estas entombigata. Oni rulas grandan ŝtonon  
antaŭ la enirejo kaj vi restas tie en via tombo.  
Ĉiuj foriras, ekregas la silento.*



**La desegnoj estas de Mayza L Torres.**

<http://www.evangelizacioncatolica.org/coleccion-de-dibujos-el-via-crucis.html>

Esperantigo de T.Fossati

<http://www.ueci.it/porinfanoj/>

NE REPRODUKTU PROFITCELE